



8-8-1974

CGC Nº

00406 504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA

Ed. Jockey Club, sala 103

Telefone (061) 226-1298

70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA

Alameda dos Maruás, 471

Telefone (011) 275-1681

04.068 - São Paulo - SP

MARÇO/ABRIL/1984

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 82



20º

Congresso brasileiro de esperanto

Piza Nacional

CAMPINAS - SP

12 A 15 DE JULHO - 1984

KONCEPTO DE LA KONGRESA AFIŜO

Sur tiu ĉi pago vi vidas la belan afiŝon kreitan de S-ro Luiz Telles, emerita ŝtata profesoro pri desegno en São Paulo, por simboli kaj propagandi la 20-an Brazilan Kongreson de Esperanto, kiun patronas la tri landaj E-organizaĵoj, laŭregule kungitaj pere de NEK - Nacia Esperanto-Komisiono.

Laŭ la aŭtoro, la afiŝo estas simpla, la simboloj facile kompreneblaj kaj la blanka fono senlima, ĉar Esperanto estas ja senlima kiel kultura instrumento, komprenebla de ĉiuj pro la internacieco de la vortaro, kaj simpla pro la admirinda logikeco kaj koncizeco de la gramatiko.

Pli detale oni povas aldoni, ke la flugantaj hirundoj volas indiki, ke la kongreso okazos en Campinas, kiu estas tradicie konata kiel urbo de la hirundoj. Dudek estas la birdetoj, ĉar la kongreso estos la 20-a evento de la serio, kaj la tri

blankaj hirundoj ŝvebantaj super la verda stelo, ene de la konturmapo de Brazilo, reprezentas la tri landajn asociojn: BEL, la plej alta, KKE tiu en la mezo kaj BKE la lasta, tiel lokitaj laŭ iliaj fondiĝdatoj. Etan detalon ankoraŭ ni rimarkigas al vi: la kvin pintoj de la verda stelo transiras la limojn de Brazilo, ĉar la aŭtoro konscias, ke la nacia movado jam transpasis niajn landlimojn kaj fariĝis internacie konata de la plej evoluintaj Esperanto-centroj.

Al Prof-ro José Telles, pro lia vere admirinda kreiĵo donace ofertita al la kongresorganizaĵoj, la Nacia Esperanto-Komisiono, en la nomo de BEL, KKE kaj BKE, prezentas ĉi tie varman gratulon kaj esprimas samtempe sian profundan dankemon.

Carlos CUNHA

GUTOJ GRAMATIKAJ ...

La Uzado de "Po"

La distribua divida prepozicio "po" estas uzebla nur kun numeraloj: "Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomojn". "Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legas en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la libron en kvar tagoj". Tia frazo kiel ekz.: "Ni veturis kvindek kilometrojn po tago" estas do erara. Devas esti: "Ni veturis po kvindek kilometroj (ĉiu) tage".

Kiel montras la supraj ekzemploj, kun "po" estas uzata ĉiam nominativo, eĉ kiam temas pri rekta objekto kaj kiam la substantivo sen "po" estus akuzativa: "Al ĉiu el la infanoj oni donis tri pomojn". "Al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomojn". Same estas ankaŭ pri la prepozicio "ĉirkaŭ", uzata en la senco "proksimume": "Mi ricevis de li ĉirkaŭ kvindek kronojn". "Ni havas jam ĉirkaŭ 40 gekursanojn". "Ni havas jam 40 gekursanojn". En tiuj okazoj oni adaptas la regulon, ke la prepozicioj regas ĉiam nominativon.

Sed ĉar ĉe tio estiĝas tia nenaturaĵo, ke rekta objekto de verbo estas tute escepte nominativa, multaj uzas post "po" kaj "ĉirkaŭ" la saman kazon, kiun oni uzus sen ili: "Ĉiutage estis legataj po dek kvin paĝoj" (subjekto). "Mi legis ĉiutage po dek kvin paĝojn" (objekto). "Mi donis al la infanoj po tri pomojn". "En nia klubo estas jam ĉirkaŭ kvindek membroj" (subjekto). "Nia klubo havas jam ĉirkaŭ kvindek membrojn" (objekto).

Kelkfoje post "po" povas esti uzata ankaŭ akuzativo de direkto: "La servistino kondukis la gastojn en po unu ĉambrojn".

Prefikse, "po" estas uzebla ankaŭ kun aliaj radikoj: "Ni vendas pogrando kaj pomalgrande" (podetale). "Li disdonadis popece sian tutan havaĵon". "Ponumera vendado de Literatura Mondo".

Rimarko: "Po" kiel slavismo povas esti ankaŭ tute evitata, kiam la klareco de la esprimo ne suferas pro tio: "Al ĉiu el la infanoj mi donis tri pomojn". "En ĉiu tago mi legos dek kvin paĝojn". "Ni veturis kvindek kilometrojn (ĉiu) tage".

(EI La Tuta Esperanto, de H. Seppik)

JUBILEA KAMPANJO

VASKE - PY3ACE

Jetfluge alŝvebas 1987. Ni kronu la centjarfeston per plia strato ESPERANTO en ĉiuebla urbo.

Ĉiu fervora sam^o sentu sin devigata tuj preni sur sin la taskon ĉirkaŭigi sin de rimedoj por kunage atingi la celon. Venkintaj batalantoj helpu aliurbanojn per akirita sperto. Tiucele mi aldonas ke, konkerendaj respondeculoj en la urbestrejo estas: ADMINISTRISTRO SEKRETARIO k/aŭ ESTRO de la URBA KONSILANTARO. Ilia (j)n kontraŭstaron oni foranĝu per oficileto, per komunaj geamikoj kaj per petskriboj el ĉiuj direktoj. Ĉiu el ni do estu preta tuj alskribi indikitan homon, laŭ peto de agantoj, por helpi en la "svatado".

MALFERMITA BILETO

(Laŭ peto)

Sinjoroj:

RONALD REAGAN, Prezidanto de Usono.

KONSTANTIN CHERNENKO, Prezidanto de Sovetunio.

— Detruado de la homaro estas en viaj manoj.

— Bonvolu malebligi tion.

La 21-an de Aprilo 1984

(a) D-ro Modesto Belmonte de Abreu, cindra kandidato, Fakdelegito de Universala Esperanto Asocio ĉe Porto Alegre-Brazilo.

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

HONORA PREZIDANTO

Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP.

Estraro

Prezidanto: Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás, 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

Vic-prezidanto: Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN Q1 02 - Cj. 08, casa 15, BR 71500 - Brasília - DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio

Jarabono Cr\$ 3.000,00

Por aliaj landoj, US\$ 5.00

Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

RESPONDECAJ DIREKTOROJ

Carlos A. S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.



TRA LA MONDO

TURISMA ESPERANTO-KALENDARO

● Eldonita de Monda Turismo - Asocio por faciligo de la internacia turismo per la aplikado de Esperanto, cirkulas ĉie en la mondo la nunjara "Turisma Esperanto-Kalendaro", kiu aperas en dek mil ekzempleroj. Ĝi enhavas bazajn informojn pri entute 525 internaciaj Esperanto-aranĝoj planitaj por la 1984a jaro. Interesitoj pri tiu grava kalendaro, skribu al Monda Turismo, P.K.45, BG-1090, Sofio, Bulgario.

KASTORA KLUBO DE ESPERANTO

● Kastora Klubo estas internacia klubo por infanoj kaj gejunuloj de diversaj nacioj. Ĝiaj ĉefaj celoj estas: disvastigi amikajn sentojn inter infanoj kaj gejunuloj; ekkoni la vivon de samaĝuloj el aliaj landoj, ties historion, kulturon ktp.; instigi infanojn kaj gejunulojn kaj uzi la Internacian Lingvon kaj labori por la lingvo kaj ties idealoj. Por fariĝi membro (aliĝo senpaga) skribu al la klubo (str. Klonowa 18, 00-591 Varsovio, Pollando) menciante via nomon, naskiĝdaton kaj adreson. Al la klubo apartenas numtempe ĉirkaŭ 6.000 membroj el 56 landoj.

NOVA ADMINISTRA DIREKTORO DE UEA

● La estraro de UEA nomis S. Milojević Ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo en Roterdamo. Li restas ĝis la maja numero redaktoro de la Revuo Esperanto, sekve li iĝos ĉefredaktoro kaj la nova redaktoro estos G. Sutton.

HONORIGO EN VANKUVERO, KANADO

● La komitato de UEA, dum la 69a UK, devos ekzameni kaj voĉdoni proponon de la estraro cele al elekto de P. Ariste kaj H. Hujucz kiel membrojn de la Honora Patrona Komitato, kaj kiel Honorajn Membrojn E. Chicot, K. Deajev, m. Miyamoto, J. Régulo Pérez kaj B. Vogelmann. D-rino Flora Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, jam sendis al ĉiu komitatanoj la biografiojn de la kandidatoj.

ESPERANTO EN VENEZUELO

● Délio Pereira de Souza resendis al la redakcio koloran fotoripri Zamenhofa festotago en Maracaibo, Venezuelo, kiun li ricevis de S-ro David G. Valecillos V. (Calle Nº 3C-72, Maracaibo - 4002). Bedaŭrinde, pro grafikaj postuloj, la foto ne taŭgis por klišo uzebla en la ofseta presado de nia Bulteno. S-ano Valecillos instruas la Lingvon ekde 1978, kaj en la lasta jaro fondis la asocion Maracaiba Esperanto-Klubo, kiu eldonas informilon nomatan Marakajba Stelo.



ĴUS APERIS

"Kiuj semas plorante . . ."

Jus aperis ĉe Universala Esperanto-Asocio la romano "Kiuj semas plorante . . ." de Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal. La verko gajnis la unufojan Premion Raymond Schwartz por proza fikciaĵo en 1980.

"Kiuj semas plorante . . ." estas psikologia, intima romano, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu rakontas pri siaj viveventoj kaj siaj psikaj sintenoj kaj reagoj al la vivo. La aŭtoroj montras, kiel homo povas erarvagi sub la influo de politika ideologio - ĉi-kaze naziismo - ĝis perfido al siaj kunhomoj kaj eĉ intimuloj. La stilo estas modera, sen superflua precizigoj. La konstruo estas kohera, ne dispecigis en ĉapitrojn. Personecaj karakterizoj estas sukcesaj, sociaj kaj politikaj eventoj klariĝas el cele efikantaj dialogoj kaj sobraj evidentaĵoj.

Éva Tófalvi naskiĝis en Mohács, Hungario, en 1947. Ŝi estas diplomito de la Universitato Eötvös Loránd, Budapeŝto, pri la hungara kaj Esperanta filologioj. Ŝi jam gajnis kvar aliajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. Ŝi estas la ĉefaŭtoro de "Kiuj semas plorante . . .". Oldřich Kníchal naskiĝis en Humenné, Ĉeĥoslovakio, en 1939. Li finstudis historion kaj filologion en Prago. Ekde 1981 li estas redaktoro de la slovakingva gazeto en Budapeŝto. En 1982 li gajnis la Premion Luigi Minnaja pro eseo. Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal estas geedzoj.

La libro estas broŝurita kun dukolora plastumita kovrilo, speciale desegnita de Franko Luin. La formato estas A5 (210mm) kun 108 paĝoj, inkluzive de biografioj pri la aŭtoroj. ISBN 92 9017 029 8. Prezo: 15,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA (plus 10% por sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

LA VIVO DE D-RO L.L. ZAMENHOF EN BILDOJ

kompilita kaj eldonita de Henk Thien, la fondinto kaj prizorganto de la Foto-Servo pri Zamenhof.

Henk Thien naskiĝis en Nederlando en 1911. Li lernis Esperanton en 1931 kaj du jarojn poste fariĝis lernejestro. Li poste instruis Esperanton per la Cseh-metodo en diversaj landoj. En 1983 aperis lia lernolibro de Esperanto por nederlandlingvanoj.

La grandformata libro (A4) estas 128-paĝa laŭtempe ordigita dokumento pri la tuta vivo de la iniciatinto de la Internacia Lingvo Esperanto. Sen analizaj aŭ provoj al interpreto oni povas sekvi lian vivon, jaron post jaro, kun la helpo de 114 elektitaj fotoj kaj 25 mapoj, presitaj sur luksa papero. Aperas ankaŭ konsiloj kiel uzi la bildlibron por artikoloj aŭ en klubvesperoj, kie oni povas aranĝi kvizojn.

La Libroservo de UEA estas la sola distribuanto kaj donas rabaton de unu triono por minimume tri ekzempleroj al la sama adreso + sendokostoj. Prezo: 30,00 guldenoj.



BRAZILAJ NOVAJOJ

FEDERACIA DISTRIKTO

★ Evitu viziti nian sidejon en Brazilja dum tiu ĉi monato. Tie vi ne plu trovos la tradician komforton, ĉar la mebloj amasiĝas unuj sur aliaj, por liveri spacon al depono de materialo uzenda en la muntado de ŝrankoj ĉe la muroj de la enlĉambro. Kompreneble, tiu averto ne validas por tiu, kiu volas ion pagi al nia kasisto...

★ Plensukcesis la Unua Spiritita Esperantista Semajno de l' Federacia Distrikto, okazigita inter la 25-a kaj 31-a de marto. Unu el la rezolucioj aprobitaj de la kunvenintoj estis plenapogi la efektivigon de la 20-a Brazilia Kongreso de Esperanto, en Campinas (julio, 12/15) kaj inciti la spiritismajn institucion aliĝi al tiu plej grava E-evento de nia lando.

BAHIA

★ Karavano kun minimume dudek personoj ĉeestos la kongreson de Campinas-SP, informis al ni samideano Carlos Alberto Nunes de Lima, lerta dua kasisto de Bahia Esperanto-Asocio.

★ Ilhéus Esperanto-Grupo kaj Itabuna Esperanto-Asocio, pere de iliaj prezidantoj, Prof. Eléus Leonardo de Sá kaj Prof. Aderaldo Rocha, kuneldonis la unuan numeron de la monata informilo SUDBAHIA ESPERANTISTO, kiu belaspektas kaj kontentigas la legantaron pro ĝia enhavo.

PARANÁ

★ Elektita la 28-an de aprilo, por enposteniĝo la 12-an de majo, ĵen la nova estraro de Paraná Esperanto-Asocio: Prezidanto, Espedita de Castro Feitosa; Vicprezidanto, Teresa Cristina Marin; 1-a Sek, Doriane Rossi; 2-a Sek, Ronie Cardoso Filho; 1-a Kasisto, Álvaro Maurício Delgado Diaz; 2-a Kasisto, Thomaz Milton Verástegui; Bibliotekistino, Nidia Terezinha Sampaio; Oratoro, Prof. Geraldo Mattos; Kontrola Konsilantaro, Salvador Raymundo, Gert Drucker, Hermanito Christensen, Nanna Carvalho Sandahl kaj Francisco José Portugal. La fakaj departementoj de PEA estas sub respondeco de: Prof. Geraldo Mattos (Edukado), Itacir Luchtemberg (Disvastigado), João Almeida Góis (Kulturo), Carla Amato (Sportoj) kaj Heloisa Kohler (Sociaj Arangoj). Al ĉiuj, BKE-estraro prezentas varmajn gratulojn kaj sincerajn deziroprimojn pri fruktodona laboro kaj feliĉa oficperiodo.

PERNAMBUCO

★ Furoras la kampanjo de Associação Pernambucana de Esperanto, cele al aĉeto de propra sidejo en Recife. Oni povas fari donacojn pagendajn dum dek monatoj, po Cr\$ 10.000,00 monate (Kategorio A), po Cr\$ 5.000,00 (Kategorio B) kaj de kiu ajn valuto (Kategorio C). Post la lasta partopago, APE sendos kvitancon por la tuton kaj, eventuale, diplomon al la donacintoj pro ilia partopreno en la kampanjo.

★ Intensivan elementan kurson de Esperanto gvidis en februaro la Prezidanto de APE, s-ano Amaro Pinangé Soares. Partoprenis la kurson artistoj de la konata "Balé Popular do Recife", kiuj deziras kontakti samideanojn en ĉiuj landoj, okaze de ekskursoj de la trupo for de Brazilo.

RIO GRANDE DO SUL

★ En la numero 81 de tiu ĉi Bulteno, estis erare citita Manoel anstataŭ D-ro Modesto Belmonte de Abreu, kiel subskribinto de malfermita bileto al Reagan kaj Chernenko aperinta en Correio do Povo, de 24-01-84. Al la Supera Juĝisto D-ro Modesto Belmonte de Abreu, senlaca batalanto por la afero Esperanto, ni petas senkulpigon pro la nevola redakcia misinformo.

★ Jus aperis la dua nunjara numero de la gaŭĉa informilo Steloj, oficiala organo de DESSEAK - Departamento de Esperanto da Sociedade Espírita "Allan Kardec" - Rua Andrade Neves, 60 - BR 90000 - Porto Alegre. En la momento, multaj opinias, ke tiu departemento estas unu el la plej aktivaj centroj de informado, propagando kaj instruado de la internacia lingvo en la tuta ŝtato. La dekpaga informilo Steloj bone impresas pro la varieco de ĝia enhavo, kiu ampleksas lokajn, naciajn kaj internaciajn eventojn, ne nur ligitajn al E-movado, sed ankaŭ al politikaj kaj sociaj temoj kaptantaj la atenton de ĉiuj homoj kie ajn.

★ Estas programita por la 20a de majo la I-a Debatrondo pri la Gaŭĉa Esperantismo, kiu okazos en Porto Alegre, ene de la Leĝofara Asembleo de l' ŝtato.

RIO DE JANEIRO

★ S-ano Ruy Cavalcanti de Albuquerque, altranga oficisto de Banco do Brasil - CACEX/DICEX, Rio de Janeiro, organizas jam de kelka tempo sliparon, kiun li nomas "Registro de Oficistoj Esperantistaj el Banko de Brazilo". Kun pozicio en 02-01-84, aperas en tiu registro 58 personoj, inter kiuj samideanoj Cunha, Almada, Dorini, Nelson kaj Délio Pereira de Souza. Ĉar ja temas pri serioza laboro, la redakcio sugestas, ke oni informu S-ron Ruy pri nomo kaj adreso de esperantistoj emeritaj aŭ laborantaj ĉe Banko de Brazilo en kiu ajn urbo de la lando.

SANTA CATARINA

★ Esperanto-Asocio de Santa Catarina (Praça 15 de Novembro 21, 4º, sala 402 - Fone 22-4836, BR 88000 - Florianópolis) decidis okazigi la

3-an Sudbrazilan E-Renkontiĝon, dum la tagoj 26/28 de oktobro 1984. Per cirkulero de 25-04-84, D-ro Walter Boppre, inda prezidanto de EASQ, petas la tujan kunlaboron de la PR/RS-kunpromociantaj asocioj cele al ordigo de la kultura programo.

SÃO PAULO

★ Prof. Walter Francini jam veturis pli ol 2.000 kilometroj je servo de la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto, de kies Organiza Komitato li estas vicprezidanto. Krom konstantaj vojaĝoj al Campinas kaj ties ĉirkaŭaĵoj, en la fino de aprilo li estis en Rio por raporti pri la evoluo de la preparlaboroj, al la estraranoj de BEL kaj KKE. Dum la translokiĝoj de Francini, ĉiam kunvojaĝas lia edzino, s-ino Rosa, kiu ne turismas, kontraŭe, ŝi efektive kunlaboras kaj helpas sian edzon, kvazaŭ ŝi estus lia profesia sekretario.

★ Unu fojon pli ni devas gratuli s-anon Gilberto Silva Velho (maljuna li estas nur en sia familia nomo), pro la regula eldono kaj dissendo senpaga de informaj cirkuleroj, sub la titolo "Esperanto Notícias". Jus ni ricevis la Cirkuleron n-ro 8 (Aprilo 1984), kiu vaste informas pri esperantaj okazintaĵoj ĉie en la lando. Flanke de tiu senkompara gazetara servo, Silva Velho ankaŭ agas persone stimulant la starigon de E-grupojn en la tuta lando, ĉu per vizitoj, ĉu per leteroj, ĉu per artikoloj, kiujn li redaktas por diversaj ĵurnaloj kaj revuoj.

★ S-ano Eurico Antonio Ribeiro, kiel nuna prezidanto de Esperanto Asocio de San-Paŭlo, decidis modernigi la laborkondiĉojn de la sidejo per enkonduko de elektra skribaŝino Facit, de kopiilo Royal, simila al modelo "xerox" kaj de presmaŝino Rotaprint, funkcia laŭ ofseta sistemo. Krom tio, la sidejo havas nun "elektronikan sekretariinon", kunligitan al la telefonaparato n-ro 62-1183. Jen sekunda ekzemplo por aliaj E-organizaĵoj en Brazilo. Gratulon, sinjoro prezidanto Eurico Antonio Ribeiro, kaj ceteraj estraranoj de EASP.



BRAZ COSENZA

Eble la ĉielo malfermis siajn orajn pordegojn por permesi la eniron al pli unu pacata soldato el la sennoma armeo pri universala frateco. Eble li alvenis tie tre laca kaj maltrankvila. Eble li ne kredas, ke tiu loko estas rezervita por homoj kiel li.

Tamen baldaŭ li komprenos ĉion kaj eble li sin prezentos por reveni pluunufoje al ĉi fizika plano por daŭrigi disvastigante idealojn je amo, paco, harmonio, libero, egaleco, frateco...

BRAZ COSENZA naskiĝis la 20-an de Aŭgusto 1906, en la urbo Campos, ŝtato Rio de Janeiro. Krom teknika kontoristo li estis advokato.

En la 14-a de Julio 1951 li fondis la institucion Kultura Kooperativo de Esperantistoj, de kies organizo li fariĝis prezidanto elektita dum 30 jaroj. Dum tiu periodo li okazigis 16 Seminariojn de Esperanto, kie ĉiam ekzistis etoson de vera kunfratiĝo.

Dimanĉon, la 25-an de Marto ĉijare, D-ro Braz Cosenza mortis, post du tagoj en komata stato. La granda batalanto pri la idealoj el Bialistok foriris al alia pli bela kampo. Ĉu verda? Ne gravas...

Restu pace karega samideano... tiuj, kiuj restas batalante, VIN SALUTAS!

A. Fausto

ABONO DE TIU ĈI BULTENO

La eldonkosto kaj afranko de tiu ĉi Bulteno estas nuntempe tro granda ŝarĝo por la buĝeto de nia Asocio. Tial, ni decidis sendi ĝin senpage nur al niaj asociaj membroj.

Comence de junio, la leganto ankoraŭ ne aliĝinta al BKE, sed kiu deziras daŭre ricevi la Bultenon, devas abonati ĝin, per pago de jara abontarifo de Cr\$ 3.000,00. Abono por eksterlandano kostas US\$ 5.00; dissendo per aervojo.

BKE-ALIĜKOTIZO 1984

La kotizo por aliĝo aŭ realiĝo al BKE en 1984 estas de Cr\$ 6.000,00, pagebla ĝis la 31-a de Aŭgusto venonta.

Por fariĝi nova ano de nia Organizaĵo, sufiĉas sendi al nia sidejo en Brazilja la koncernen pagon, prefere per simpla ĉeko de la propra interesito, kune kun aldonaj informoj pri tuta nomo, naskiĝdato, civila stato, instrunivelo, telefonumero se eblas kaj kompleta adreso.

Aliĝu tuj. Ni ja bezonas vian helpon!

HALELUJA!

*Ni renaskiĝas nepre ĉiutage!
Ni renaskiĝas ĉiam kaj senpage
kiel la lumo en la horizonto.
La homo ĉiminuta ne similas
al tiu hieraŭa, kaj ne brilas
la sama stelo nuna en estonto . . .*

*Dank' al tio la mondo estas bela
kaj la vivo fariĝas ne sencela
kunordiĝo de horoj kaj minutoj.
Do valoras la penon la ekzisto
vivoplena, sen timo kaj sen tristo
sen malsaĝaj kvereloj aŭ diskutoj.*

*Renaskiĝe ridetu al ĉirkaŭo
kaj ĉiam tostu al la hodiaŭo
pro iliaj esencaj cirkonstancoj. . .
Estu de ni laŭdataj l' uraganoj
la ŝtormoj kaj la neĝo, la vulkanoj
— la mirakloj de l' viv' en la substancoj!*

*Estu de ni laŭdataj homoj puraj
ekologiaj luktoj senmezuraj
protektado al nia tersurfaco!
Estu laŭdata ĉiu batalanto
por la venko de l' lingvo Esperanto
simbolo de l' progreso kaj de l' paco!*

Jorge das Neves

NUR UNU KISO


*Unu kison mi deziras
por mildigi mian soifon.
Sed venu de vi
tiu kiso,
ununura kiso,
unu dolĉa kiso
por kvietigi
sen sofismoj
sentime
la ardan soifon
kiu miajn ĝojojn konsumas
kaj postlasas min senforta
en glacia izoleco.
Unu kison mi aspiras . . .
Ĝi havu ankaŭ la aromon kaj guston
de la amikeco,
kiu bonfaros
al mia amsoifanta koro.
Jes, ununuran kison mi aspiras,
unu dolĉan kison,
kvazaŭ ĝi estus dia inspiro,
longdaŭra kaj neforgesebla
ĝis mia vivofino.*

Maria Luzineide de Souza

*Esperanton uzu parolante, studu
legante kaj ne fuŝu skribante.*

ŜAKLUDO

Nº 3747 - J. E. Coutinho
Inédito - 1984
1º Prémio



Mato per du movoj

La solvo de la problemo aperos sur
Bulteno n-ro 83, kune kun la nomoj de
ĉiuj, kiuj skribos al la Redakcio
indikante korekte la ŝlosilmovon.

*Legu tiun ĉi Bultenon por ke vi
konu novajn faktojn; abonu por ke ĝi
povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu
interesa.*



KONTRIBUAĴOJ POR LA BULTENO

Financaj kontribuadoj estas ĉiam bonvenaj por la subteno de nia Bulteno. Al la subaj asociaj membroj kaj legantoj, kiuj monhelpis aŭ abonis nian Bultenon dum la lastaj monatoj, la redakcio prezentas sian koran dankon:

Paulo Gitahy de Alencastro, Francisco André de Paula Canavezzi, Antonieta Almada Miranda, Manoel Torres de Abreu, Álvaro Fausto de Souza, Elísio da Rocha Dória, Ruth Alves Medeiros, Maria José Pontes, Francisco Carlos Couto de Moraes, Alberto Guedes Curopos, Mozar Alves de Andrade, Delma Terezinha de Carvalho, Paulo Vicente da Mota, Allan Kardeck Afonso Costa, Ary Zamora, Annita Laguna Gramignia, Francisco Rodrigues de Moraes Sobrinho, Hermínia Azevedo Magalhães, Joaquim de Carvalho, ĉiu po Cr\$ 800,00	15.200,00
Antonio Felix da Silva	1.000,00
Francisco Jurandir de Melo, José Alves Ano Bom, Adonis Saliba, Laila Mattar, Luiz Antonio Pereira Menechino, Nelson da Costa Barreto, ĉiu po Cr\$ 1.800,00	10.800,00
José Hirton Xavier, Maria das Graças Silva, Darcy Botelho Lima, Geraldo José Samary de Andrade, ĉiu po Cr\$ 2.000,00	8.000,00
Ricardo F. da C. França	2.300,00
Ivo Sanguinetti	2.800,00
Luiz de M. Cavalcanti	3.800,00
Cláudio Zimmermann, Nelson Bernardo, Antonio de Pádua Soares, po Cr\$ 4.000,00	12.000,00
Godofredo de Araújo Goes, Salvador Raymundo, José Bastos Campos, Benedito de Paula, Elias Couto de Almeida, po Cr\$ 5.800,00	29.000,00
Francisco de Souza Almada	20.150,00
Maria P. Almada	25.800,00
	130.850,00

FAKTOJ KAJ FOTOJ



D-ro Braz Cosenza, ĵus forpasinta, inter aktivuloj de la landa movado (BKE-kongreso, Brazilja, 1982).



Du eksterlandaj geamikoj. S-ino Clara Hess kaj Ing. Barrocas, okaze de la Unua Sudbrazila E-Renkontiĝo, en Porto Alegre-RS.



Grupo ĉeestanta la inaŭguron de elementa kurso ĉe Artgalerio Esperanto - Santos, (1984).

TUDO SOBRE O 20º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Cidade sede: Campinas (SP), de 12 a 15 de julho de 1984.

Promotores: Liga Brasileira de Esperanto, Cooperativa Cultural dos Esperantistas e Conselho Brasileiro de Esperanto, unidos pela Comissão Nacional de Esperanto.

Apoio: Poderes Executivo e Legislativo de Campinas, através do dr. José Roberto Magalhães Teixeira, m.D. Prefeito Municipal e dr. Ozayr Rizzo, m.D. Presidente da Câmara de Vereadores.

Cooperação: Associação Paulista de Esperanto.

Comissão Organizadora: Prof. Oswaldo Sangiorgi (presidente), prof. Walter Augusto Francini (vice-presidente), prof.a Elvira Fontes (secretária geral), Symilde Schenk Ledon (1ª secretária), Francisca Martos (2ª secretária), Eurico Antonio Ribeiro (1º tesoureiro) e Maris Aparecida Tuon (2º tesoureiro). **Coordenadores de comissões:** Deodato de França Mello (informação), Rosa Rogério da Silva (festas e excursões). Maria Antonia Ladalarido (recepção) e dr. José Luiz Ferreira (tema do congresso).

Correspondente em Campinas: João Miguel Aguilera Jr., fone (0192) 52-5938.

Inscrições: Rua Faustolo 124, CEP 05041, São Paulo (SP), escritório central da Comissão Organizadora. Telefone: (011) 62-1183.

Taxas: A partir de junho/84: Adulto - Cr\$ 6.000,00; Acompanhante - Cr\$ 3.000,00; Menor até 14 anos - Cr\$ 1.800,00; Associação (esperantista ou não) - Cr\$ 12.000,00.

Tema do congresso: Integração no movimento esperantista brasileiro.

Cartaz: Criação artística do Prof. Luiz Telles, de São Paulo (SP).

Locais do congresso: Salão Vermelho do Paço Municipal, na Av. Anchieta, 200 e Escola Estadual de 1ª e 2ª graus "Carlos Gomes", no Largo das Andorinhas s/nº. O salão vermelho receberá durante o congresso o nome de Salão Zamenhof e as salas da Escola Carlos Gomes receberão os nomes de esperantistas já falecidos: Braz Cosenza, Carlos Domingues, Ismael Gomes Braga e Laszlo Zinner.

Reuniões e conferências: Estão programadas reuniões especiais para delegados da Associação Universal de Esperanto, compiladores de dicionários de Esperanto, vegetarianos, interessados em questões linguísticas e grupos religiosos. Haverá palestras sobre ensino, medicina, física, comunicação e outros temas.

Cursos: Para o público não-esperantista está programado um curso-relâmpago de Esperanto, a ser ministrado pelo prof. Sylla Cahves. Os esperantistas principiantes terão oportunidade de praticar o idioma nos "grupos de conversação", dirigidos pelo dr. Victor Sadler.

Reserva de hotéis: Informações pelo telefone (011) 62-1183.

Alojamento: Disponíveis 80 leitos, em aposentos separados para cada sexo, com prioridade para estudantes, no Palácio dos Esportes. Os pernoites serão grátis, havendo porém uma taxa de inscrição por pessoa, de Cr\$ 1.000,00, a ser paga até 30-06-84. Será prudente levar roupa de cama.

Comercialização de bens: Interessados na comercialização de livros, discos, material didático e quaisquer objetos deverão obter autorização prévia da Comissão Organizadora e acatar as instruções desta.

Apresentação de teses: Serão lidas e debatidas em plenário as teses, moções e indicações apresentadas por esperantistas devidamente inscritos no congresso. Os interessados deverão enviar duas vias de seu trabalho à Comissão Organizadora, até 30-06-84, redigidos em Esperanto e datilografados em espaço dois, papel tamanho ofício.